

ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri dumonata agado, de 2023-11-15 ĝis 2024-01-15.

Ŝlocilpunktoj: novaĵoj pri la 57-a ILEI-kongreso; raportoj pri Zamenhof-tago kaj Tago de la Esperanta Libro; invito al vica ILEI-forumo por instruistoj “Lerneja Esperanto-agado”; novaĵoj el sekcioj, inkluzive novajn afrikajn; grandioza Esperanto-Programo 2024 en Herzberg am Harz; evoluo de kursaro Tibor Sekelj; Homa Ĉeno-9; IPR kaj JA survoje al 5 afrikaj landoj; novaj kunvenoj de la retgrupo pri universitata agado; kunlaboro kun Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (Hungario), Ĉina Radio Internacia, Zaozhuang-Universitato (Ĉinio), ILEI ĉe la 42-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO.

Eventoj

Zamenhof-taga programo pere de Italio kaj ILEI

La 12-an de decembro 2023 Itala Esperanto-Federacio okazigis eventon okaze de la Zamenhofa-tago pere de Zoom. Prelegis Zlatoje Martinov (Serbio), verkisto, tradukisto kaj literatura kritikisto. Estis klera kaj festa momento por ankaŭ havi eblon fari demandojn.

ILEI-Kongreso 2024

Post la anonco de la loko kaj dato de la sekvontjara kongreso komenciĝis densa preparado. La aktuala informo pri la kongreso estas publikigata en la paĝaro de ILEI, en IPR, en EKO. Estas kreita aparta retejo: <https://2024.kongreso.org/> Alvokoj pri la kongreso mem kaj simpozio aperis en la retejo de ILEI (https://www.ilei.info/konferenco/2024/ALVOKO_57a_ILEI-KONGRESO.pdf) kaj estis dissenditaj tra ĉiuj kanaloj de ILEI. Alvoko ankaŭ sonis en Radio Havana (fine de decembro), en EsperRadio. **Do, bonvolu, spekti, ĝui kaj aliĝi:** <https://youtu.be/EdDOd7OJ2z4>

ILEI-forumoj

Daŭras forumoj por instruistoj “Lerneja Esperanto-agado”. Sekva reta kunveno okazos marde la 23-an de januaro 2024 je 18:30- 19.30 UTC. Zoom-ligilo: <https://us02web.zoom.us/j/85429455204> ID: 854 2945 5204

Pasvorto: esperanto. Dum tiu kunveno Koffi GBEGLO prezentos Esperanto-agadon en Instituto Zamenhof, Lomeo, Togolando.

La iniciatinto de la forumoj Dider Janot dissendis alvokon pri la Laborgrupo pri Esperanto en lernejoj: <https://www.ilei.info/novajxoj/laborgrupo-E-en-lernejoj.php>

Sekcioj

Fine de novembro la estrarano pri Landa agado Marija Jerković preparis detalan raporton pri sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj de ILEI en 2022. Vidu ĉe la ĉefpaĝo de

www.ilei.info en la rubriko “Novaĵoj” aŭ rekte:
https://www.ilei.info/instancoj/Sekcia_agado_2022.pdf

Januare Marija dissendis novan alvokon kun la demandaro por sekcioj pri la jara raporto pri 2023. ***La Estraro petas ĉiujn sekciestrojn kontribui!***

Fine de novembro venis bonaj novaĵoj de la ĵus fondita nova sekcio de ILEI en Kenjo de ĝia estro Gilbert Simiyu Sikala pri instruado de Esperanto en bazlernejoj, en preĝejoj, en altlernejoj kaj universitatoj. Krome, niaj kolegoj organizis en decembro trejnseminarion por novaj instruistoj – la 14-17.12.2023 – en la urbo Chwele kun 15 partoprenintoj (unkluzive 6 junulojn), el kiuj 12 sukcese finis ĝin. La seminario estis tre fruktodona kaj oni programis, kiel la instruado en Kenjo estos farita.

Ankaŭ alia nova, ĵus registrita ILEI-sekcio el Ganao ĝojigis nin per sia raporteto (fare de ĝia sekciestro Alfred Kobina Arthur): “Okazis Zamenhofa Tago en la lernejo Lutheran (St. Paul’s Lutheran School) kune kun klubanoj en la lernejo, teamo de ILEI-Ganao kaj instruistoj en la sama lernejo. La speciala gasto estis s-ro Paul Kwesi Mensah kiu prelegis pri historio de D-ro L. L. Zamenhof. Ni kune kantis komunan kanton “Bona Amiko”, poste interbabilis kun niaj lernantoj dum kiam ili postulas diversajn temojn pri Esperanto. Ni jam instruis Esperanton sep semajnojn ĉe la lernejo Lutheran, unuhoro-semajne. La lernantoj ferios sekvontan semajnon kaj ni rekomencos instruadon de Esperanto la duan semajnon de Januaro, 2024. Estas plano prepari lernantojn por skriba A 1 – ekzameno. Ni esperas ke la ideo kuraĝigos ilin plu studi. Ni ankaŭ nuntempe esploras oportunon kunlabori kun aliaj lernejoj tutmonde kie oni instruas Esperanton por ke niaj lernantoj havu okazon interbabili rete kaj koresponde”. ***Gratulojn al niaj novaj sekcioj!***

Germana Esperanto-Centro (EGS) el Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo prezentis grandiozan programon de diversaj eventoj por 2024 jaro. Vidu: <http://esperanto-urbo.de> (multlingva) ***La Estraro kore gratulas niajn samideanojn pro ilia sindonema laboro por Esperanto!***

Aperis nova retejo de hispanaj instruistoj: <https://ilei.esperanto.es>. ***Bonvolu, viziti kaj saluti niajn samideanojn!***

Projektoj

La kursaro Tibor Sekelj

Bone evoluas sukcesa unstruado de Esperanto pere de Zoom de IrEA (Irana Esperanto-asocio). Laŭ la propono de sekretario Elena Nadikova, la prezidanto Ahmad Mamduhi preparis resuman tabelon pri tiu kursaro por vidi ĝiajn atingojn. Jam okazis kursoj en 9 naciaj lingvoj (rusa, vjetnama, indonezia, araba, ĉina, svahila, persa, kurda, urdua) kaj Esperanto por la niveloj A 1, A 2, B1, B 2, C 1. Instruis tre famaj instruistoj. En januaro estas planata kurso por azianoj (nivelo B 2) gvidota de Renato Corsetti kaj nova universitata kurso en Kongo subgvide de Ahmad Reza Mamduhi. ***Ne hezitu aliĝi! La retejo: <https://www.espero.ir/eo/kursaro/>***

Se vi scias pri kurso de Esperanto en universitato aŭ pri instruanto en universitato, kiu estas esperantisto, bonvolu informi Ahmad Mamduhi, mamduhi@gmail.com, aŭ Renato Corsetti, renato@esperanto.org.

Tago de la Esperanta Libro kaj naskiĝtago de Zamenhof

Zamenhof-tago, la 15-a de decembro, estas ankaŭ la Tago de la Esperanta Libro. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) tradicie proponas verkon por komuna legado dum tiu tago. Por 2023 oni elektis du malsamajn verkojn, inkluzive por komencantoj. Spertaj esperantistoj povis legi kaj diskuti la kleran eseon *La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo* de Julius Glück, dum komencantoj povis same kontentige ĝui la unuajn tri ĉapitrojn de *La teorio Nakamura* de Anna Löwenstein. Ambaŭaj tekstoj elŝuteblas ĉe: <https://www.ilei.info/> en la rubriko “Novaĵoj”. Artikolo pri la Tago de la Esperanta Libro 2023 kun alvoko aperis en UEAfacila ankaŭ kun kunligoj por elŝuti la tekstojn. Vidu ankaŭ:

https://youtu.be/w2aA2tz2hJ4?si=0IOMECudHA_kkav9

Esperantistoj en Serbio organizis ĉeestajn renkontiĝojn: la 7-an de decembro en Uŝice (Nacia Biblioteko, 13:00), la 15-an de decembro en Subotica (Urba Muzeo, 18:00), la 16-an en Beogrado (Biblioteko ‘Milan Budimir’), kaj ankaŭ en Vrŝac. En Beogrado antaŭ la programo okazis ankaŭ ekzameno (A2-nivela).

Homa Ĉeno

Aperis jam la 9-a serio de tiu sukcesa projekto de ILEI, vidu: <https://youtu.be/JZWHRRjDKxk>. La pretigado por la 10-a parto survojas.

Universitata agado

En la novembra kumpensado de laborantoj por esperanto en universitato oni disponigis la raporton pri la simpozio okazinta en la universitato de Seviljo (Hispanio) kaj pri la sukceso de la kurso por universitataj profesoroj en la sama universitato. Tiu kurso de Esperanto en universitato por profesoroj (ne por studentoj) vere estas unika en la Esperanta mondo.

Sekvis detala raporto pri la kursoj de Esperanto en la malĉeesta hispana universitato UNED, kiuj malgraŭ la kosto trovis lernantojn kaj al kiuj nun la prizorgantoj pensas eĉ aldoni trian superan nivelon.

Fine estis ankaŭ raportetoj pri la aranĝo de prelegoj en Esperanto kaj en la persa en la universitato de Teherano kaj pri la okazaĵoj en la universitato de Giridhar Rao el Barato kaj de Antonio Leoni el Kostariko.

La kumpensigado de la 4-a de decembro pasis kun partopreno de gekolegoj el Barato, Britio, Ĉinio, Francio, Hispanio, Irano kaj Serbio. Temis pri diverslandaj eventoj, aparte pri kursoj por profesoroj en Hispanio kaj pri okazaĵoj en Zaozhuang, Ĉinio. Oni diskutis proponon de Radojica Petroviĉ pri ebla utiligo de la fondaĵo *Erasmus Mundus* por internaciaj kursoj. La temo pli diskutotas.

IPR kaj JA

Eks-prezidanto de ILEI Mireille Grosjean kunlabore kun la redaktoro de Juna Amiko Stano Marček organizis sendadon de IPR kaj JA al Afriko: al DR Kongo (orienta parto), Burundo, Kenjo, Tanzanio kaj Senegalio. Ĉiuj ricevos po 10 kilogramoj da revuoj – entute 920 ekzempleroj de IPR kaj JA, po 184 al ĉiu lando. La numeroj de IPR estas por 2020-2023 kaj de JA – por 2019-2023, do, sufiĉe freŝaj. La iniciato estas financita de la Asocio ‘Scio Sen Bariloj’. ***ILEI esprimas grandan kaj koran dankon al niaj kolegoj-samideanoj pro tiu valora kontribuo!***

Poiome disvolviĝas la reklama kampanjo por JA. En EKO 2023/66 kaj 69 denove aperis informo kaj bela alvoko pri la revuo, faritaj de Stefan MacGill: <https://www.ilei.info/revuoj/index.php?lingvo=eo>

Kunlaboro kun enmovadaj institucioj

Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo, Hungario, dissendis belan alvokon partopreni en la 57-a ILEI-kongreso kaj ĝia simpozio. ***Koran dankon al niaj samideanoj!***

Kun Ĉina Radio Internacia (ĈRI)

Fine de novembro aperis artikolo de Alessandra Madella por Ĉina Komunikila Grupo pri la festo por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato kaj sekvontmonate - pri ludoj inter ĉinaj kaj eksterlandaj gestudentoj ĉe Zaozhuang-Universitato:

<https://esperanto.cri.cn/2023/11/24/ARTIAJuDCM8wKHI2VA5LuzrP231124.shtml>

<https://esperanto.cri.cn/2023/12/04/ARTIMjQY0ddhJBmgJVbajisy231204.shtml>

Decembre por ĈRI Alessandra Madella voĉlegis la poemon “Nekonata Floreto”, verkitan de Tang Dezhi kaj esperantigitan de Li Chuanhua:

<https://esperanto.cri.cn/2023/12/21/ARTITmKY84HhMhnGFLA2Tde9231221.shtml> kaj aperigis la intervjuon kun Anna Löwenstein pri ŝia libro pri “La Teorio Nakamura”, proponita ĉi-jare por Tago de Esperanta Libro

<https://esperanto.cri.cn/2023/12/14/ARTIpJksnBjcappri2I82mjo231214.shtml>

Kun Zaozhuang-Universitato

La partnero de ILEI, la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato, Ĉinio, fine de 2023 festis sian unuan jubileon – dekjariĝon. Celebrado daŭris du monatojn: de la komenco de oktobro ĝis la komenco de decembro. Kaze de tiu evento decembre la prezidanto Ahmad Mamduhi sendis sian gratulmesaĝon kaj la vicprezidanto Alessandra Madella partoprenis ĉeeste en festaj aranĝoj. Siajn gratulojn sendis ankaŭ la labor-grupo ‘Esperanto en Universitato’ de UEA, ILEI, TEJO kaj ESF. Sinoro Semio (Sun Mingxiao) estis la ĉeforganizanto de la celebrado, kiu havis kiel honorajn gastojn la prezidanton de UEA kaj iaman prezidanton de ILEI Duncan Chartes kun lia edzino Cecily Lee, kaj vidis la varman partoprenon de la rektoro, vicrektoroj kaj estroj de la universitato. Dum la ceremonio estis substrekata la kunlaboro de ILEI por kompletigi la muzeajn kolektojn de *Juna Amiko* kaj

Internacia Pedagogia Revuo, ankaŭ dank'al la helpo de Zsófia Kóródy kaj Stano Marček. Dank'al la sukceso de tiu evento, la Universitato oficiale anoncis la malfermon de du pliaj elektaj kursoj de Esperanto por studentoj ne de la Esperanto-fako venontan semestron. Legu pli ĉe:

<https://esperanto.cri.cn/2023/11/24/ARTIAJuDCM8wKHI2VA5LuzrP231124.shtml>

<https://esperanto.cri.cn/2023/10/30/ARTI95nhBBVjYgDoKgFoZXMe231030.shtml>

Kun UEAfacila

UEAfacila aperigis varbadan artikolon por la Tago de la Esperanta Libro de ILEI kaj faciligitan formon de intervjuo de Alessandra Madella al S-ro Semio.

Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj

Kun UNESKO

En Parizo de la 7-a ĝis la 22-a de novembro 2023 okazis la 42-a Ĝenerala Konferenco de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). En ĝi partoprenas delegitoj de 194 membro-ŝtatoj kiuj decidas pri agado de UNESKO. Dank' al sia longdaŭra agado por Monda Edukado, ILEI ricevis inviton ĉeesti kiel Ne-Registara Organizo (NRO) kaj sendis tri observantojn: Emmanuel Desbrières, Gilles Tabard, Didier Janot. Paralele okazis junulara forumo, kun multaj junuloj de diversaj landoj, malfermaj al internaciaj rilatoj. Tiam eblis montri la gravecon de Esperanto kaj de ILEI por Monda Edukado al landaj delegitoj, al observantoj de diversaj instancoj kaj al junuloj partoprenantaj la junularan forumon.

En 2025 la 43-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazos en Samarkando, Uzbekio. La Estraro atente pritraktos tiun eventon.

Pli da informo aperos en Internacia Pedagogia Revuo (IPR).

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Ahmad Reza Mamduhi

2024-01-15